

Tra kruca vojo.

De la jaro 1948 ne estis en Ĉeĥoslovakio religia libereco, eklezio estis kruele persekutata kiel malamiko de socialisma ŝtato kaj kredantoj estis konfuzataj per malveraj informoj en gazetaro kaj radio. Per nereligia „Katolika agado“ estis eldonata „Katolika gazeto“. Oni strebis fortiri pastrojn kaj kredantojn de ekleziaj estroj, Vatikano estis la plej granda malamiko.

Sabate de la 18-a de junio 1949 predikis en Strahov praga ĉefepiskopo D-ro Josef Beran. Li konsciis pri tio, kion la kredantoj volas aŭdi de li. Tial li klarigis rekte kaj unusignife la vidpunkton de Eklezio en la tuta traktado kun la ŝtato. La ĉefepiskopo bone antaŭvidis, ke baldaŭ oni parolos pri li kiel pri malamiko de laborista klaso, laboristoj kaj ŝtato, kiu ne strebas ekkompreni sociajn demandojn. Tial ankaŭ ĉi tie ripetis tion, kion jam proklamis, ke li ne estas malamiko de laboristaro, el kiu li eliris kaj neniam tia estos. Ĉar li bone konis, kiel prizonulo de naciisma koncentrejo, la metodojn de malamikoj de Eklezio, klare proklamis: „Mi ne scias, kio okazos kun mi, kiomfoje mi ankoraŭ predikos. Eble vi ekscios, ke mi akceptis diversajn aferojn, kion heroldos radio en la tutan mondon, sed mi proklamas antaŭ ĉiuj, antaŭ la tuta nacio kaj la tuta mondo, ke tio estos mensogo.“

Kredantoj bone komprenis la voĉon de sia paŝtisto kaj akordis kun li. Tion ili pruvis ankaŭ per tio, ke ili akompanis lin al la Ĉefepiskopa Palaco kaj per ĉi tiu manifestacio ili dokumentis, al kiu ili kredas kaj kiun ili rigardas kiel sian ĉef-estron.

Venis dimanĉo, la 19-a de junio, 1949. En pli multo de preĝejoj en nia lando estis legita komune paŝtista letero, kiu malkaŝe sciigis al la kredantoj, kiel aspektas la stato de la intertraktadoj, kiu fiaskigis ĝin, kiuj estas komplikoj de rompadado de la unueco de Eklezio en nia lando kaj donis klaran direktivon, kiel konservi la unuecon kun vera Eklezio de Kristo. Ĉi tiu dimanĉo jam klare montris, ke ne ĉiuj pastroj restis en ĉi tiu batalo kun ĉiuj episkopoj fidelaj al Eklezio, ke iujn jam atakis timo, timo de perdo de enspezoj kaj surteraj bonaĵoj, kiujn promesis al ili ŝtato. Tial ili la paŝtistan leteron ne legis, aŭ mallongigis ĝin. Estis eĉ tiaj pastroj, kiuj nomis ĉi paŝtistan leteron malamika provoko kontraŭ la respubliko.

La lasta najlo en la ĉerkon de intertraktadoj inter Eklezio kaj ŝtato estis la Kristkorpa festo en katedralo St. Vito. Tiun feston post funda preparado uzis la malamikoj de la Eklezio kiuj volis kaŭzi provokojn kaj fine forigi la malamatan ĉefepiskopon. Katedralo pleniĝis pli ol neniam anteaŭe. Sed estis evidenta tuj de la komenco, ke la plimulton de la partoprenantoj estis viroj, kaj precipe pli junaj. En la katedralon tiutage ne estis enlasitaj ĉiuj. Nur ekleziuloj, monaĥoj kaj florknabinoj povis eniri senhalte. Al ceteraj kredantoj oni diris, ke la Kristkorpa festo estas prokrastita aŭ ŝoviĝas al alia horo. Tamen, torento da viroj plenis la katedralon. Ili ĉiuj havis en la jakfaldajo de mantelo enpikitajn pinglojn kun bluaj, neokulfrapaj kapetoj. Ili ĉiuj povis tuj eniri. Pri tiu fakto estis ekleziaro atentigita.

Komenco de diservoj estis trankvila. Ĝi montris tamen, ke la nepetitajn gastoj ne sciis kiel konduti en preĝejo. Sed venis la prediko de ĉefepiskopo Beran. Post kelkaj vortoj, kiam li volis tuj ĉe la komenco diri ke Katolika Agado ne estas katolika kaj Katolika gazeto ne estas katolika, ekaŭdis fajfado en la preĝejo, kaj tio estis la signalo por senekzempla provoko. En la preĝejo ekis kriego, vokado de honto, fajfado kaj ia trumpetado. Kiam la Ĉefepiskopo ekvidis tion kaj vidis antaŭ si vicajn de infanoj kaj florknabinoj, petis laŭte: "Protektu infanojn". Kiam la tumulto daŭris, teologoj kaj pastroj komencis kanti la ĥoralon de "Sankta Venceslao" kaj post ĝi la nacian himnon, „Kde domov můj“.

La ceremonioj ne plu daŭrigis kaj ĉefepiskopo Beran senvestiĝis kaj iris tra spaliro de pastroj, teologoj kaj fidelaj katolikoj el katedralo. Sur la kastela korto kaj precipe sur Hradčany placo kaj antaŭ la ĉefepiskopa palaco kolektiĝis homamaso de kredantoj, kiu vokis al Ĉefepiskopo gloron kaj en tion miksiĝis la fajfado de fidungitaj provokantoj kaj ilia kriado. Ankaŭ tie estis kantata Ĉeĥoslovaka himno. Kiam la ĉefepiskopo venis en sian palacon, venis al li kelkaj membroj de SNB kaj iliaj gvidantoj diris al la ĉefepiskopo, ke ili estas senditaj por protekti lin kaj esti al lia dispono. Sed la ĉefepiskopo diris, ke li neniam povas timi, kaj ke li ne bezonas ilian protekton. Tuj telefonis

la ministerio de internaj aferoj kaj protestis kontraŭ tio, kio okazis kaj ke li ne bezonas kaj ne petis iun protekton de SNB. Kiam fine kolera amaso antaŭ la palaco disiris, SNB patroloj estis retiritaĵ el la palaco.

Ĉiu el la ĉeestantoj tiam tuj klare sciis, kies verko tio estis. Hodiaŭ oni tion scias precize. La provoko, kiu celis definitivitan apartiĝon de la klerikaro kaj la kredantoj kun ilia ĉefepiskopo, estis malsukcesa kaj fariĝis granda historia makulo, dokumentante senskrupulecon de maldelikataj rimedoj por subpremi kaj detruigi la Eklezion en nia lando. Provoko atingis la ĝustan malon ol tio, pro kio ĝi estis organizita. Tie klare rekonis kredantoj kaj ekleziularo, de kie la vento blovas. Sed tio ankoraŭ ne estis ĉio. Al ĉefepiskopo Beran sciigis la ministerio, ke por lia protekto estis destinita unu viro, kiu ĉiam veturos kun li en lia aŭto, kiamajn li veturos el la ĉefepiskopa palaco. Ankaŭ kontraŭ ĉi tio la ĉefepiskopo protestis, kaj kiam li ne povis atingi la nuligon de ĉi tiu kontraŭleĝa kaj degradiga ordo, diris, ke li nenien veturos.

Proparolanto de ministerio tamen avertis lin, ke li devus veturi je pastra konsekro, kiu estus donata en la seminaria preĝejo de sankta Adalberto en Dejvice. Al tio ĉefepiskopo respondis, ke li nenien veturos kaj ke la novpastrojn konsekros konsekra episkopo de Prago D-ro Ant. Eltschner. Tiel okazis kaj de tiam ĉefepiskopo el sia palaco neniam eliris.

La 8an de januaro 1950 mortis Episkopo de Banská Bystrica D-ro. Škrábik. Laŭ validaj ekleziaj leĝoj transiris la tuta jurisdikcio al rezidenca kapitulo, kiu havis el siaj vicoj elekti la kapitulanan vikaron, kiu gvidus la diocezon ĝis nomumo de nova episkopo. La 13an de januaro kanonikoj elektis kiel kapitulana vikario papan prelaton Monseñor Daniel Briedoň. Lia elekto estis valida, sed ĝi ne plaĉis al la ŝtataj aŭtoritatoj, ĉar li estis fidela membro de la kapitulo kaj fervora defendanto de religia partio kaj juro. La 24an de januaro 1950 sendis la Slovaka Oficejo por Religiaj Aferoj al d-ro. Briedoň leteron, en kiu ĝi petis klarigon, kial la kapitulo en Banská Bystrica ne plenumis la jurajn preskribojn kaj ne petis anticipan konsenton al la elekto de la kapitulana vikario. Estis klare kiel la sunlumo, ke doktoro Briedoň ne estas por la slovaka religia oficejo la taŭga persono kaj ke ĝi volas ĉiakoste forigi lin. Tion kompensis la kapitulana vikario mem kaj por konservi pacon la 11an februaron 1950 rezignis pri funkcio de la kapitulana vikario. Ĉi tion utiligis Slovaka Oficejo por Religiaj Aferoj, kiu kontraŭ ĉiuj validaj kaj ŝtataj leĝoj nomumis tuj kiel la kapitulana vikario de la Banská Bystrica diocezo pastron Jan Dechet, kiu volonte akceptis la nomumon kaj tuj ankaŭ donis promeson al ŝtato.

Per la nomumo de la kapitulana vikario per Slovaka eklezia ofico estis rompitaĵ kaj ŝtataj kaj ekleziaj leĝoj. Eklezia leĝo diras, ke iu ajn, kiu akceptos la eklezian oficon el manoj de ŝtata civila administrado, estos per ĝi ekskomunikita el Eklezio. Tial Jan Dechet estis tuj laŭ validaj ekleziaj leĝoj ekskomunikita el Eklezio, eĉ antaŭ la deklaro de ekskomunikita dekreto de la Papa Kurio, kiu estis plua preteksto de registarinstancoj kaj patriotaj pastroj por drastaj atakoj kontraŭ Eklezio. Tio estis plua signalo por la amasa arestado de pastroj, kiuj restis fidelaj al la Papa Kurio. Ankaŭ la distriktaĵ ekleziaj sekretarioj komencis vetkuri en forprenado de ŝtataĵ permesoj de pastroj fidelaj al Petra Kurio, kaj tiel preĝejoj kaj paroĥejoj komencis malpleniĝi de pastroj, kiuj ekplenis malliberejojn kaj precipe fabrikojn kaj metiejojn kaj aliajn civilajn entreprenojn, kien ili apenaŭ povis veni kiel pastroj. Printempe en la jaro 1950 komenciĝis grandaj procezoj kun grupoj de pastroj, kiuj estis la rekta preludo al la plej brutala interveno de ŝtata potenco, sopiranta pri la eklezia havaĵo, likvido kaj anekso de ĉiuj viraj kaj inaj monaĥejoj sur la tuta teritorio de respubliko. Tiel ŝtato, kiu kondamnis la germanajn naziajn koncentrejojn, mem fondis aliajn koncentrejojn kaj ĝis la lasta litero piedpremis artikolon de la konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko pri libereco de religio. Kion malsukcesis Jozefo la 2a, kiu dissolvis kaj likvidis nur iuj monaĥejoj, kion malsukcesis Napoleono, kiu forpelis la monaĥojn el kelkaj monaĥejoj, kion malsukcesis Bismark kaj Bach, por kio estis malforta ankaŭ mem Adolf Hitler, kiu en nia lando fermis nur kelkajn virajn kaj precipe virinajn monaĥejojn, tion sukcesis dum unu nokto en aprilo ĉeĥoslovaka registaro kiu per tio atingis la veran primaton de subpremo de religia libereco kaj homaĵ rajtoj tra la longa historio de niaĵ nacioj.

Iom da historio por komparo: La 12an de januaro 1783 komenciĝis rekta dissolvo de monaĥejoj.

Por monaĥejo kaj preĝejo de sankta Kajetano, kiun administris ordo de Teatinanoj, estis tragika tago jaŭdo la 20a de februaro 1783. Antaŭ tiu tago okazis multaj trarigardoj de la monaĥejo, kunscribado de havaĵo kaj taksado de monaĥejo.

Tiun tagon ne ĉeestis monaĥejestro, provosto, kaj tiel estis la dekreto transdonita al vikario de monaĥejo Don Andreo Haugvic. Li kunvokis siajn membrojn kaj diris al ili ke la imperiestro Jozefo la 1a per speciala dekreto nuligas la monaĥejon kaj preĝejon. Ĉi tiu informo rapide disvastiĝis tra Prago kaj vespere ruliĝis fluoj de pragaj katolikoj en la preĝejon de sankta Kajetano, kie per solenaj mesoj la kredantoj adiaŭis kun siaj pastroj. Ĉiu membro ricevis „ŝtatan gastdonacon" 150 ormonerojn kaj povis preni siajn personajn aĵojn, kun kiuj ili disiris en siajn hejmojn kaj al konatuloj. La preĝejo kaj monaĥejo estis poste vendita kaj dum kelkaj jaroj la preĝejo tute orfiĝis. Kapelo de Virgulino Maria de Einsiedel estis malkonstruita, la sonorilturo ĉe la preĝejo kaj ankaŭ la sonoriloj, kiuj estis gisitaj fare de Nikolao Iöw el Iöwenburk, estis translokitaj al la turo de la preĝejo de la Sankta Spirito en la malnova urbo kaj la bela baroka predikejo estis poste kopiita al la preĝejo de sankta Nikolao en České Budějovice. Certe interesa komparo kaj tre instrua kiel diferencas la dua duono de la 18a jarcento de la duono de la 20a jarcento. Ĉi tie ĉiu povas respondi, kie ekzistis pli da homeco, justeco kaj socia sentemo, ĉu tiam aŭ en la jaro 1950.

Arestado, akuzo kaj juĝado de pastroj kaj episkopoj.

Estis lundo la 27an de marto 1950.

Meze de la ĉambro staris prokuroro JUDr. Čížek, kiu anoncis, ke estis donita akuzo de ŝtatperfida kaj spiona grupo de religiaj superuloj, agentoj de Vatikano por krimoj de perfido kaj spionado pro kiu kungrupiĝis ĉi tiuj akuzitoj:

Augustin Michalka, abato de la monaĥejo de premonstratoj en Nová Říše, Vít Bohumil Tajovský, abato de la premonstrata monaĥejo en Želiv, František Šilhan, provincialo de jezuita ordeno en Ĉeĥoslovakio, Silvestr Brait, religia pastro de dominikana ordeno kaj profesoro de teologia fakultato en Olomouc, Jan Mastilák, religia pastro de la redemptorista ordeno kaj rektoro de teologia instituto en Obořiště, Adolf Kajpr, religia pastro de la jezuitoj, František Mikulášek, religia pastro de jesuita ordeno, Jan Blesík, ministro de monaĥejo de redemptoristoj en Prago, Josef Urban, religia pastro de franciskana ordeno kaj Stanislav Barták, provizoro de premonstrata monaĥejo en Nová Říše.

Prokuroro Čížek, kiu en sia parolado ne ŝparis vortojn kiel kanajlo, fiegulo, ks, dume signife skuadis per sia krispa kapo, dirante nur koncize sencon de akuzo kaj poste donis al deko da investigantoj dokumentojn (protokoloj) de la unuopaj akuzitoj. Ĉiu kun unu investiganto iris en unu ĉambron kaj tie la investigantoj tralegis akuzojn, rezultantaj el la protokolo. Fine ĉiuj denove kunvenis kaj D-ro Čížek tie konstatis, ke de tiu momento ili transiras de esplora aresto al juĝa aresto, en kiu ankoraŭ antaŭ tribunalo laŭ la leĝo ili havos interparolon kun sia advokato eks ofo. Poste ilin po unu ili forkondukatis reen en ilajn ĉelojn.

Sabato la 1an de aprilo 1950. Matene oni forveturigis ilin denove al Pankrác, kie komenciĝis la dua procezo. Denove estis plena salono. Maldekstre de tribunalejo estis instalita ekspozicio de aĵoj, onidire konfiskitaj en monaĥejoj en Želiv kaj Nová Říše. Estis tie monstrancoj, kalikoj, ciborioj, abataj pektoraloj, bastonoj, sed ankaŭ pistoloj, maŝinfusiloj, ŝargiloj kaj amaso de dolaraj banknotoj. Jam el tio videblas, kiel mensoge estis la pastroj akuzitaj.

Merkrede la Sanktan semajnon, la 5an de aprilo 1950 estis anoncita verdikto, kiu estas kaj restos neforviŝebla makulo de ŝtata justico kaj eterna atestanto de mansogeco de tiama reĝimo. Denove bone razitaj kaj zorgeme vestitaj venis ĉiuj akuzitoj en plenplenan salonon por aŭskulti verdikton. Glora ŝtata tribunalo prenis siajn lokojn, prezidanto de senato Dr-o Jaroslav Novák malfermis la lastan tagon de la traktado kaj post la fina parolo de popola prokurorino Brožová prenis vorton prezidanto de tribunalo, Dr-o Jar. Novák kaj nome de respubliko anoncis la verdikton: Jan Mastilák ĝis morte, Augustin Machalka kaj Frant. Šilhan por 25 jaroj, Vít Tajovský por 20 jaroj, Silvestr Brait por 15 jaroj, Jan Urban por 14 jaroj, Adolf Kajpr por 12 jaroj, Jan Blesík por dek jaroj, Frant. Mikulášek por 9 jaroj kaj Stanislav Barták por 2 jaroj. Plue monpunoj en alto 10-50 mil kronoj,

konfisko de persona havaĵo kaj perdo de civitanaj rajtoj por pluaj dek jaroj. Prezidanto poste tralegis motivojn de verdikto kaj fine demandis unuopajn akuzitojn, ĉu ili akceptas la verdikton. Ĉiuj diris trankvile kaj klare: „Jes, mi akceptas“. Post mallonga konsulto kun advokato ĉiuj la verdikton subskribis.

Sabato la 15an de aprilo tre tristigis ĉiujn. Iu havis viziton, kiu alportis deprimigan informon, ke en Prago estis likviditaj klostroj kaj ĉiuj monaĥoj nokte de la 13a al 14a de aprilo 1950 ien forveturigitaj.

La pastroj estis komence arestitaj en unuopulaj ĉeloj. Ŝanĝon alportis, kiam ili estis forkondukataj por diversaj laboroj. Iun tagon forkondukis ilin el izolejoj grupgvidanto Sirácký, kaj diris, ke li trovis fine laboron el ilia fako kaj ke ili laboros „je propra“. Tio por ili estis komprenebla nur kiam ili venis al la celloko. Ili trairis internan pordegon kaj haltis antaŭ preĝejo de sankta Leopoldo. Tio estis prizona preĝejo, kie ankoraŭ antaŭ ilia alveno estis celebrata sankta meso. Kaj nun ili eksciis, ke ĝi estos malkonstruita. Unue oni volis ĝin ŝanĝi je kulturĉambro, poste je deponejo kaj nun estis decidita pri ĝia malkonstruo. Kaj al tiu laboro estis venigitaj ĉiuj katolikaj pastroj, ĉu junaj kaj maljunaj, sanaj aŭ malsanaj. Laboris tie P. Blesík, episkopo Ján Vojtašák, episkopo Pavel Gojdič, episkopoj Barnáš, Buzalka kaj Stan. Zela, plue kanoniko Dr-o Kulač, prelato Dr-o Josef Čihák, ĉiuj jam maljunaj kaj meritaj ekleziuloj. Ĉirkaŭ ili staris ĉefserĝentoj kaj komandantoj kaj ĝoje rigardis, kiel pastroj mem malkonstruas preĝejon. Estro demandis P-on Braito, kiel li sentas sin, kiam li mem malkonstruas la preĝejon. Kaj P. Braito trankvile respondis: „Tute bone. Unue ni devas la preĝejon malkonstrui, por ke ni poste povu konstrui novajn preĝejojn, pli grandajn kaj pli belajn, ol estas ĉi tiu.“

Tio estas nur konciza priskribo de situacio en la 50-aj jaroj de pasinta jarcento, pri persekutado de eklezio kaj arestado, suferado kaj malgloro de pastroj kaj episkopoj. P. Jan Blesík estis kondiĉe liberigita marde la 29-an de marto 1960 kun kondiĉo je 6 jaroj. Al tio li aldonis: „Tiel mi fariĝis la 29-an de marto 1960 denove almenaŭ parte homo (en malliberejo ĉiuj estis nur numeroj) post pli ol dek jaroj de mallibereco, kiujn mi hodiaŭ tamen rememoras kiel okazo, kiun donis al mi S-ro Dio mem por montri al mi, kiel en praktiko aspektas senespera batalo kontraŭ Dio, kiun mi ĝis nun konis nur el libroj.“